

Gazeto




Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

36-a Jarokolekto - Septembro 2022 - N-ro 126

Guadix

(Granado)



Julio / Septembro 2022

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
- P. 06 Gonzalo Guerrero, la andaluzo kiu memvole fariĝis majao.
- P. 12 Fusión esperantista.
- P. 13 Lingva Angulo: *Los adverbios de lugar.*
- P. 19 Poezia Angulo.
- P. 20 Nuntempa Vortaro: *Tertremoj*
- P. 22 Folioj por Praktikado.
- P. 28 Turismi en ...
Guadix (Granado).
- P. 33 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Ramón Fernández Jurado. La almeria elmigrinto en Katalunion.*
- P. 35 $E=mc^2$ Scienca Angulo: *En la spaco vid-kapablo malpliboniĝas.*
- P. 36 Flamenko: Alonso Nuñez "Rancapino".
- P. 38 Fervojista angulo: *La krimoj de la Ekspresa Trajno de Andaluzio en 1924*
- P. 41 Nun Ni. Junulara Paĝo.
- P. 43 Komikso.
- P. 49 Andaluzia kuirarto: *Ovoj laŭ la monaĥa stilo.*
- P. 51 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La strato de la kvin buloj en Malago.*
- P. 53 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante
COLABORADORES:
Vicente Herrera Cobo
Daniel Mata
Macael Pérez Heredia

*Sur la kovrilo:
Kaverno-domoj en Guadix (Granado)*

ESPERANTO EN ANDALUZIO

SIDEJO DE KORDOVA ESPERANTO-ASOCIO EN LUCENO (Kordovo).-

Kvankam ankoraŭ ne oficiale inaŭgurita la Esperanto-movado disponas pri nova sidejo en Andaluzio. Temas pri ĉambraro havigita de nia samideano José Carlos Pérez en la urbo Luceno (Kordovo), ĝuste ĉe la historia kvartalo de ĉi tiu belega vilaĝo en la sudo de la provinco Kordovo.

Afiŝo apud la enirejo de la konstruaĵo jam montras, ke tie troviĝas sidejo de Kordova Esperanto-Asocio. Sendube estus oportune organizi festan renkontiĝon por inde bonvenigi ĉi tiun novan lokon kaj samtempe por danki la afablecon kaj sindonemon de nia lucena samideano José Carlos



LA ORGANIZADO DE LA 81-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN SEVILO EKMARŜAS.-

Sciate ke la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en la urbo Seviljo, de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro 2023. Jam formiĝis organiza komitato, ene de ĝi renkontiĝas ofte sevilaj esperantistoj kaj de aliaj andaluziaj urboj. Dank'al la streboj de Lola G. Perea oni jam atingis indan kongresejon, tiel la ĉefaj aktoj de la kongreso okazos ĉe la sidejo de la sindikato UGT, en la avenuo Blas Infante de Seviljo.

Oni pridecidis la ĉefan temon de la kongresuo, kiu traktos pri "Esperanto, komprenemo inter popoloj". Venontaj renkontiĝoj de la organizantoj celos difini

kiel eble plej detale la programon de la kongreso, kolekti informojn pri taŭgaj restadejoj por partepronotoj kaj ankaŭ ellabori programon pri ekskursoj kaj kulturaj vizitoj al Sevilo kaj ĉirkaŭaĵoj.

Do, ne forgesu rezervi tiujn tagojn por ĉeesti la Hispanan Kongreson de Esperanto de la jaro 2023 en Sevilo. Belega urbo atendas vin!



Sidejo de la 81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo
12-a / 15-a de oktobro 2023

LASTATEMPE NI RICEVIS JENAJN VIZITOJN.-

- Fine de la pasinta monato oktobro vizitis Andaluzion niaj kanadaj gesamideanoj Zdravka Metz kaj Normad Fleury. Temas pri internacia paro (li kanadano, ŝi kroata). Ili organizis la pasintan Universalan Kongreson de Esperanto en Montrealo.
- En januaro vizitis Malagon Andy Hernández, kubano loĝanta en Madrido. Li renkontiĝis en la kafejo "Esperanto" kun malagaj esperantistoj.
- En februaro vizitis Malagon, Sevilon kaj Kordovon la franca paro Elizabet kaj Pedro Ledru.



Zdravka, Conchi kaj Normand
en Setenil de las Bodegas (Malago)



Ángel, Alejandro, Mariló kaj Andy
antaŭ la kafejo "Esperanto" en Malago



Elizabet kaj Pedro en
Kordovo



Zdravka, Ĉema kaj Normand
en la Moskeo de Kordovo



Carlos, Conchi, Ángel, Mariló, Pedro kaj Elizabet en Malago

Gonzalo Guerrero, la andaluzo, kiu memvole fariĝis majao

Okaze de ĉiuj bataloj kaj konkeroj ekzistas soldatoj de armeoj kiuj, vole ne-vole, fariĝas anoj de la ĝis tiam konsiderataj kiel malamikoj. Volontaj transfuĝintoj aŭ eksaj milit-prizonuloj finas siajn vivojn ene de la socio kontraŭ kiu, ili antaŭe batalis. Ĉi tio okazas ne nur nun-tempe sed ankaŭ mezepoke.

La ĉefrolulo de nia hodiaŭa historio estas andaluzo, li naskiĝis proksimume la jaro 1470 en la vilaĝo Palos de la Frontera, en la andaluzia provinco Onubo, *Huelva* en la hispana lingvo. Li nomiĝis Gonzalo Guerrero (prononcu: *Gonzalo Gerero*).



En la jaro 1492 la katolikaj gereĝoj konkeris la urbon Granadon.
Kiel soldato de la kastiliaj trupoj troviĝis Gonzalo Guerrero

Ĉirkaŭ la jaro 1490 la katolikaj gereĝoj, tio estas Elizabeto de Kastilio kaj Ferdinando de Aragono, luktis kontraŭ la lasta islama regno-lando en la Ibera Duoninsulo, tio estas kontraŭ la emir-lando de Granado. Ĉi tiu milito finiĝis komence de la jaro 1492, ene de la trupoj komanditaj de Gonzalo Fernández

de Córdoba luktis kiel arkebuz-soldato Gonzalo Guerrero. Post la konkero de Granado li sekvis la kordovan militestron en Napolon (Italio), tie la hispanaj trupoj ekigis lukton en la jaro 1501.

En la jaro 1510 Gonzalo Guerrero troviĝis denove en Hispanio. Li decidis ekigi indian aventuron, tiel li marŝis en la amerikan kontinenton kiel soldaton apud Diego de Nicuesa, kiu estis nomumita prefekto de la zono Veragua. En la ĵus trovita amerika kontinento, hispanaj konkerantoj luktis unu kontraŭ la aliajn kun la celo plifortigi siajn povon kaj influon en la novaj teritorioj. Tiel, guberniestro de Veragua, en la nuntempa Panamo, estis malamiko de la prefekto de Nova Andaluzio, norde de la nuntempa Kolombio. Gonzalo Guerrero fariĝis soldato en la armeo de Diego de Nicuesa.

En la jaro 1511 Gonzalo Guerrero decidis vojaĝi apud la kapitano Juan de Valdivia en Darien, en la insulo Hispaniolo, en la nuntempa Dominika Respubliko, tie troviĝis la ĉefa reprezentanto de la kastilia reĝo en la nova kontinento. La celo de la vojaĝo estis atingi la rangon de oficiro en hispana ŝipo. Li eliris de Darien la 15-an de aŭgusto de la jaro 1511, tiutage ventoj kaj maro ŝajnis esti favoraj por la mara vojaĝo.



Tamen, en la tria tago de la vojaĝo okazis granda tempesto. Uraganaj ventoj damaĝis la ŝipon kaj grandegaj marondoj detruis la ferdekon. Dudek homoj sukcesis enŝipiĝi ene de malgranda boato, post terura vojaĝo nur ok el ili sukcese piedpremis la jukatanan marbordon. Indiĝenoj de la tribo Kokomo loĝis ĝuste ĉe la loko kie la hispanoj alvenis. Kvar el ili mortis okaze de lukto,

la kvar ceteraj restis malliberigitaj de la tribo, inter ili troviĝis Gonzalo Guerrero. La sacerdoto Teohom ricevis ilin kiel sklavojn. Ĉe la tribo ĉiuj ili devis labori ĝis elĉerpiĝo. Nur supervivis du homoj, Geronimo Aguilar kaj Gonzalo Guerrero. En la tribo ili daŭre laboris kiel sklavoj, ili devis transporti lignon, fiŝkapti, kultivi maizon ktp. Ili estis je la tuta dispono de la tribanoj.



La majaa ĉefo Taksmar' sciis pri la ekzisto de tiuj du sklavoj, kiuj antaŭe estis spertaj militistoj. Do, li decidis akcepti ilin por ricevi konsilojn kaj instruojn de tiuj du hispanoj kaj tiel, lukti kiel eble plej efike kontraŭ aliaj malamikaj triboj. Gonzalo instruis la majaan estron pri defendaj kaj atakaj strategioj, pri la dispono de la armeoj, uzo de armiloj ktp. Tiel, dank'al la hispanoj kaj ĉefe al Gonzalo, Taksmar' formis tre kapablan trupon kiu sukcese venkis najbarajn malamikajn tribojn. La majaa ĉefo agnoskis la helpon riceviton de la hispano.

Taksmar' decidis donaci la sklavon Gonzalo Guerrero al militestro de la urbo Ichpaatún. Okazis, ke la sklavo kaj la nova mastro transiris riveron, tiam kajmano atakis ilin kaj Gonzalo sukcese savis la vivon de la majaa mastro, kiu,

siafoje, decidis liberigi la hispanan sklavon kiel dankon al li. Kiel libera homo Gonzalo fariĝis militisto, sendube la plej taŭga kaj sperta en la tribo. Li akceptis la majan kulturon kaj viv-stilon, do, li faris sur sia haŭto tatuajn desegnaĵojn kaj li traboris siajn orelojn. Lia kapableco kiel militisto ebligis venkojn dum luktoj kontraŭ aliaj triboj, kiel rekompenco la triba ĉefo Na Ĉan Kan donacis sian filino Zazil Ha al la hispano kiel edzinon.

En la jaro 1519 ekspedicio de Hernán Cortés, hispana konkeranto, alvenis en la insulon Kozumel'. Tie, la indiĝenoj sciigis al li, ke du kastiliaj sklavoj loĝis ĉe apudaj triboj. La hispana konkeranto sendis al ili mesaĝojn pere de aliancitaj tribestroj kun la celo liberigi ilin. Verdire, Cortés bezonis interpretistojn por daŭrigi la konkeron de la nuntempa Meksiko.

Gerónimo de Aguilar, kiu ankoraŭ restis kiel sklavo, ricevis la mesaĝon de Hernán Cortés. Aguilar konvinkis sian mastron subteni aliancon kun la hispanoj kaj tiel li povus elliberiĝi. Tuj, Gerónimo de Aguilar kontaktis kun Gonzalo Guerrero, tiam li sciis pri la alveno de la hispanoj kiuj deziris liberigi lin, evidente ili ne sciis, ke li jam estis libera homo. Apud la mesaĝo Hernán Cortés sendis al li donacetojn. La respondo de Gonzalo Guerrero estis tute klara:

Mia frato Aguilar, ĉi tie mi havas edzinon kaj tri gefilojn. Mi estas estimata kiel kaciko kaj kapitano dum militoj. Mi estas tauita kaj miaj oreloj traboritaj, kiel aliaj indiĝenaj militistoj. Ĉu ĉi tiu aspekto estus akceptata de tiuj hispanoj? Do, iru kun Dio. Vi vidas, ke miaj gefiloj estas belaj, al ili mi donacos tiujn verdajn bidojn, kiujn vi donacas al mi havigitaj de tiuj fratoj kiuj venis de mia



Monumento omaĝe al Gonzalo Guerrero kaj lia majaa familio en Merido (Jukatania-Meksiko)

Do, Gonzalo Guerrero rifuzis la proponon reveni apud la hispanoj. Male, li preferis instrui la indiĝenojn pri kiamaniere lukti kontraŭ la konkerantoj, ĉar li estis tute certa, ke fine hispanoj venus kun la celo konkeri kaj okupi tiujn terojn. Li eĉ luktis kaj venkis la ekspedicion de la konkeranto Monejo kaj la kapitano Davila, batalo okazanta en la nuntempa Natura Parko Champoton.

En la jaro 1536 okazis batalo inter majaoj kaj hispanoj en la vilaĝo Tikamajo, ĉe la nuntempa Honduraso, komandis la hispanan armeon la kapitano Lorenzo Godoy. Gonzalo Guerrero troviĝis tie kun la celo helpi Cikumba, kaciko de Tolupan. Dum la lukto, sago penetris en la stomakon de Guerrero kiu ankaŭ ricevis pafon de arkebuzisto. Oni diras, ke la indiĝenoj transportis la vunditon en

arbaron. Tie, li petis al siaj milit-kunuloj priatenti siajn gefilojn kaj al la ceteraj soldatoj daŭrigi la lukton kontraŭ la konkerantoj. Fine Gonzalo Guerrero mortis kaj lia korpo restis meze de la kamparo. Hispanoj prenis lin kaj ili tuj konstatis, ke temis pri la hispano kiu luktis apud la indiĝenoj. Verdire li estis tatuata kaj vestita kiel majao, tamen li havis barbon kiel eŭropanoj. Kiel lasta

omaĝo hispanoj ĵetis la korpon en la riveron, tiel la akvo-fluo portus lin en la oceanon.

Depost tiam hispanoj abomenis la figuron de Gonzalo Guerrero, ĉar kompare al Gerónimo de Aguilar, kiu restis fidela al la hispana reĝo kaj al la kristana religio, Guerrero decidis akcepti la majaan kulturon, ĝiajn estrojn kaj eĉ formi familion kun la kaptintoj.

Post la sendependiĝo de Meksiko komence de la 19-a jarcento, multaj homoj prezentis lin kiel simbolon de la kunfandiĝo inter indiĝenoj kaj eŭropanoj, tiel stariĝis monumentoj en kelkaj meksikaj urboj omaĝe al tiu andaluzo kiu volonte fariĝis majao.



Esperanto *Ponto inter popoloj*



Ponto "La Pepa" en Kadizo, finkonstruita en la jaro 2015

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivis la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2023.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2023.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto

Fusión Esperantista



Macael Pérez Heredia

¿Una lengua común para todas las personas para que puedan comunicarse sin problemas? ¿Intercambios culturales sin necesidad de hablar el mismo idioma? Todo esto es posible gracias al Esperanto, pero aunque su propósito sea noble realmente esta función ya la cumple el inglés, por lo que sería difícil suplantarlo, ya que el inglés es la lengua más extendida del mundo y controla un monopolio cultural mundial con todas sus propagandas, películas, videojuegos, series etc.

La razón de por qué el Esperanto no cumple esa función es que realmente no les interesa perder eso por muy fácil que sea aprender Esperanto, pero ¿Y nosotros, podemos hacer algo? Desde mi punto de vista creo que sí y procederé a explicar por qué.



Las personas normales como nosotros podemos crear cultura, canciones, dibujos, videojuegos independientes etc. Lo que nos da un potencial increíble para lograr divulgar el Esperanto, ya que no hay nada que nos impida crear en Esperanto y sólo hace falta alguien con una idea que enganche a las

masas para que se interesen por el Esperanto, pero no una idea para atraer gente, sino una idea independiente fusionada con el Esperanto, es decir algo que interese a las personas pero con el Esperanto como característica secundaria. De este modo la gente podrá centrarse en lo que les llamó principalmente la atención, pero aprenderá Esperanto de forma indirecta.

Puedo basar esta teoría en mis propias creencias sobre que las personas nos sentimos atraídas por cosas que nos interesan, pero somos capaces de aprender múltiples cosas a la vez, un gran ejemplo de esto son las series, por ejemplo nos pueden llamar la atención los personajes, historia o incluso su ambiente y si realmente te interesa la verás ya sea en inglés, francés o en Esperanto, aunque sea subtitulada al español, pero con esto conseguimos introducir a las personas hacia un nuevo mundo lleno de nuevas posibilidades para aprender unos sobre otros con el Esperanto, ya que podríamos hacer grandes intercambios culturales beneficiosos para todo el mundo con esta idea, o al menos eso es lo que pienso.



Entre los propios esperanto-parlantes hay quien se lleva las manos a la cabeza cuando alguien insinúa, o incluso afirma, que el esperanto es una lengua artificial. La verdad es que no debería tomarse esta calificación como algo despectivo, porque *¿Qué lengua no es artificial?* Todas han sido inventadas por el género humano, solo que de algunas conocemos a su autor y de otras no. Sinceramente, el hecho de desconocer quien fuera la primera persona en adaptar palabras del latín hasta convertirlas en la primera versión de castellano no puede suponer ningún mérito para este idioma, si lo contraponemos al hecho de que de otros idiomas, entre ellos el esperanto, sí conocemos a su autor.

Además, existen idiomas que se califican como "*naturales*" de los que sí se conoce su autor y nadie intenta desprestigiarlos diciendo que son artificiales. Así, el actual euskera o "*euskera batua*" (lengua vasca unificada), no es sino una adaptación elaborada en los años '60 por los lingüistas Koldo Mitxelena y Luis Villasante de algunos dialectos vascos antiguos y que hoy se ha estandarizado para ser la lengua de una comunidad política. También el hebreo actual es una adaptación del antiguo por parte del lexicógrafo Eliezer Ben Yehuda a finales del siglo XIX y la verdad, es que nadie tacha a estas lenguas como artificiales con el objeto de desprestigiarlas, es más hoy en día son idiomas oficiales de un Estado y de sendas comunidades políticas y ambas lenguas gozan del máximo prestigio y cuentan con una apreciada literatura.

Por otra parte *¿Acaso el término "artificial" es algo despectivo?* Artificiales son las vacunas y nos han salvado de una pandemia. Así que bienvenida sea la artificialidad si se trata de algo creado y que puede ser beneficioso para la humanidad.

De todos modos, vamos a dejar el tema de la posible consideración o no del esperanto como artificial, porque es una cuestión sobre la que podrían escribirse tratados y sin duda hay voces mucho más expertas para abordar este tema.

Lo que sí vamos a hacer en este número es hablar de algo que, sin ningún género de duda, sí es artificial en nuestro idioma internacional, es decir, es un apartado de nuestra gramática que no tiene su fundamento en alguna de las lenguas que se llaman "*naturales*". Se trata del "*Cuadro de Voces Simples*" y en estas páginas vamos a tratar uno de sus apartados, el relativo a las palabras que preguntan o se refieren a un lugar.

En primer lugar hay que decir que el famoso cuadro de voces simples del esperanto es un sistema cartesiano con el que se crean decenas de términos, principalmente adjetivos y adverbios. Así, con una combinación de raíces y desinencias podemos aprender fácilmente términos como *quién*, *cuándo*, *dónde*, *cómo*, *ese*, *nunca*, *cuánto* etc. Y así hasta un total de 45 términos, son las llamadas "*vozes simples*".

ĈI-	I-	KI-	NENI-	TI-
colectivo	indefinido	interrogativo, relativo	negativo	demonstrativo
		-E (lugar)		
ĉie	ie	kie	nenie	tie
<i>en todos lados</i>	<i>en algún lado</i>	<i>dónde, donde</i>	<i>en ningún lado</i>	<i>allí</i>

En este cuadro cartesiano vamos a tratar hoy aquellas voces simples, que se refieren a un lugar, es decir, vamos a ver cómo se traducen términos como: *dónde*, *aquí*, *allí*, *en ningún lugar*, *en algún lugar* etc.

En primer lugar y estudiando el eje cartesiano de las raíces vamos a ver cómo empiezan todas estas voces simples, así:

Raíz	Se utiliza para:
ĈI-	indicar el colectivo, la totalidad.
I-	para referirse a una idea de indefinición.
KI-	preguntar.
NENI-	negar.
TI-	indicar algo concreto.

En el otro eje del cuadro cartesiano encontramos las terminaciones, en este caso nos vamos a centrar en el final que se utiliza para indicar "*lugar*", se trata de la vocal "E". Así, obtenemos los siguientes términos:

Voz	Significa
<i>Ĉie</i>	en todos lados.
<i>Ie</i>	en algún lado.
<i>Kie</i>	dónde.
<i>Nenie</i>	En ningún lado.
<i>Tie</i>	Allí.

Vamos a estudiar ahora cada una de estas "*voces simples*" y que, según hemos ya indicado, se tratan de adverbios de lugar.

KIE

Se utiliza para preguntar por un lugar, así que se puede traducir "dónde" o "donde" si lo utilizamos no como interrogativo sino como relativo.

<i>Kie estas la aŭtomobilo?</i>	¿Dónde está el automóvil?
<i>Kie vi estas?</i>	¿Dónde estás?
<i>La urbo, kie troviĝas Eifel-turo estas Parizo.</i>	La ciudad donde se encuentra Torre Eiffel es París.

A "*kie*" se le puede añadir el final "n" indicando acusativo de dirección y así se traduciría como "a dónde". Es decir, se trata de "donde" pero indicado un movimiento.

<i>Kien vi iras?</i>	¿A dónde vas?
<i>Mi iras kien vi deziras.</i>	Voy adonde tú desees.

El acusativo de dirección se emplearía con verbos que dan idea de movimiento, p.ej. "*iri*", "*promeni*", "*marŝi*" etc. Por supuesto no podríamos decir "*Kien vi estas?*", porque el verbo "esti" no es un verbo de movimiento.

Así que recuerda, si quieres preguntar "dónde" usa *KIE*. Y si quieres preguntar "a dónde", usa *KIEN*.

IE

Utilizamos esta voz para referirnos a un lugar indefinido. Su traducción podría ser "*en algún lugar*", "*en algún sitio*". Es decir, hablamos de un lugar pero sin poder o querer concretar de qué sitio se trata.

Veamos algunos ejemplos con IE:

Mi perdis mian bolkrajonon ie, eble en la lernejo.

Yo perdí mi bolígrafo en algún lugar, posiblemente en el colegio.

Si le añadimos el acusativo de dirección y formamos IEN, nos referiremos a "algún lugar indefinido al que nos dirigimos con movimiento".

Mi iros ien en la montaron por ekskursi.

Yo iré a algún lugar en la montaña para hacer una excursión.

A veces se utiliza también la partícula *AJN*, cuyo significado da más énfasis a la indefinición. Así: "*ie ajn*", en algún lugar que puede ser cualquiera.

Recuerda la despedida típica de muchos esperantistas

Ĝis iam ie !

(¡Hasta alguna vez en algún lugar!)

NENIE

El adverbio "*nenie*" se utiliza para negar algo relacionado con un lugar, así podría traducirse como "*en ningún lugar*", "*en ningún sitio*". Veamos algunos ejemplos:

Mi nenie vidis tiom da homoj.

En ningún lugar he visto tanta gente.

Ĉiuj konis la informon, kvankam ĝi venis de nenie.

Todos conocían la noticia, aunque no vino de ningún lado.

Si le añadimos el acusativo de dirección y formamos *NENIEN*, estaremos dando la idea de negar un lugar al que pretendidamente nos dirigimos con un movimiento. Ejemplo:

Vi iros nenien per tiu malnova aŭtomobilo

No ireis a ningún lugar con ese viejo automóvil.

TIE

Con esta voz formamos el adverbio que indica un lugar concreto. Su traducción sería "*allí*", "*en ese lugar*". Si queremos indicar una idea proximidad le añadiremos o le antepondremos la partícula "*ĉi*". Así, *ĉi tie* o *tie ĉi* se usaría para indicar "*aquí*", "*en este lugar*".

Veamos algunos ejemplos:

Ĉi tie mi havas la librojn, vi jam povas legi ilin ie.

Aquí tengo los libros, tú ya puedes leerlos en algún lugar.

Kie estas via domo? ¿Dónde está tu casa?

Mia domo troviĝas tie, post la ĝardeno. Nenie vi vidos tiel belan konstruaĵon.

Mi casa se encuentra allí, detrás del jardín. En ningún lugar tú verás una edificación tan bonita.

Si a *TIE* le añadimos el acusativo de dirección y formamos *TIEN* indicaremos que algo se encuentra allí, pero dando una idea de movimiento.

Mi iros tien morgaŭ. Yo iré allí mañana.

TIE: allí, en ese lugar.

TIEN: hacia allí.

Morgaŭ mi iros tien.

Ĉu vi jam estas ĉi tie?

Ne, mi ankoraŭ estas tie.

ĈI TIE: aquí, en este lugar.

ĈI TIEN: hacia aquí.

Mañana iré allí.

¿Tú ya estas aquí?

No, yo todavía estoy allí.

ĈIE

La raíz "*ĉi-*" da idea de totalidad, de conjunto de cosas. Pero atención, se trata de una raíz, porque no hay que confundirla con la partícula "*ĉi*", que como hemos visto da idea de proximidad y que ya vimos anteriormente en "*ĉi tie*".

Ĉie da idea de la totalidad de lugares, de un conjunto de sitios. Ejemplos:

Vi trovos esperanto-parolantojn ĉie.

Encontrarás esperanto-parlantes en todos lados.

Li estas tre agrabla homo, ĉie li estas amata.

Él es una persona muy agradable, en todos lados es querido.

Si queremos añadir una idea de movimiento, le añadiremos la "n" del acusativo de dirección, así, "*ĉien*" sería "*a todos lados*", "*hacia todos lados*".

Per esperanto vi povas vojaĝi ĉien.

Por medio del esperanto tú puedes viajar a todos lados.

Vamos a terminar esta sección con algunos ejemplos de voces simples, recuerda que son adverbios, que indican idea o lugar.

Kie vi trovis mian amikon?

¿Dónde encontraste a mi amigo?

Mi vidis vian amikon ie, tamen mi ne memoras nun kie mi trovis lin.

Yo vi a tu amigo en algún lugar, sin embargo ahora no recuerdo dónde lo encontré.

Mi vidis vian amikon nenie, li ne ofte eliras el sia domo.

Yo no he visto a tu amigo en ningún lado, él raramente sale de su casa.

Mi estas tute certa, ke mi parkis la aŭtomobilon ĉi tie, sed nun mi ne kapablas trovi ĝin.

Estoy seguro de que aparqué el coche aquí, pero ahora no soy capaz de encontrarlo.

Kien vi vojaĝos?

¿A dónde vas a viajar?

Mi iros en Italion, tie estas eble vidi tre belajn monumentojn.

Yo iré a Italia, allí es posible ver monumentos muy bellos.

Seguiremos estudiando en próximos números el cuadro de voces simples, esta vez para preguntar por cantidades, tiempo, modo etc. Se trata de un elemento de nuestra gramática del que no podemos negar que es artificial, en tanto que salió de la mente del Dr. Zamenhof, creador del Esperanto. Pero no puede negarse que se trata de una construcción muy útil para formar y recordar palabras. No nos avergoncemos de que nuestro idioma pueda ser calificado como artificial. ¿Acaso todo lo que hoy es útil surgió por generación espontánea? ¡No! Fueron creación de una persona o de un grupo de personas. El Esperanto también.



Diras la fontano...

Ne, ne silentis la fontano,
ne silentiĝis...

Ĝi ridis,
saltis,
babilis...Kaj neniu sciis
kion ĝi diris,

Klara, gaja, polifonia,
salomona koloneto
traboris
la silenton de okcidento
kaj, babilema, erektiĝis
por vidi la sunon forpasantan.

Ne, ne silentis la fontano,
ne silentiĝis...

Kiel noktovejno,
traborilo,
frida arĝento,
longiĝis
kaj mallongiĝis...

Suprenis
kaj malsuprenis,
babilis...Kaj neniu sciis
kion ĝi diris...

Kiam la aŭroro revenis...



Manuel Machado Ruíz
Sevilo 1874 ~ Madrido 1947






Esperantigis: Antonio Marco Botella




NUNTEMPA VORTARO


TERTREMOJ aŭ SEISMOJ



Seismografo




Seismogramo



Mikroseismoj

Fokuso

Mar-tremo




Cunamo

Tertrema svarmo



Magnitudo




Seisma risiko



Seismologo



Tektonikaj plakoj



**Skalo de Richter aŭ
Loka magnituda skalo**



Folioj por Praktikado

LA AVENTUROJ DE ALICIO EN MIRLANDO

Alicio, jam **longan tempon sidinte** apud **sia fratino** sur la deklivo, tre enuigis pro senokupo. Unu, du foje ŝi prove **rigardis en la libron** kiun la fratino legas, sed povis vidi en ĝi **nek desegnojn nek konversaciojn**, kaj "por kio utilas libro" pensis ŝi, "enhavanta nek desegnojn nek konversaciojn?" Ŝi do **ekpripensis** -ne tre vigle ĉar la tago estis varma, kaj **ŝi sentis sin** tre **dormema-ĉu la plezuron** fari ĉenon **el lekantetoj** valorus la laboron **sin levi** kaj kolekti lekantetojn, kiam **tutapude preterkuris** blanka kuniklo kun paleruĝaj okuloj.

> longan tempon

Vemos que estas palabras aparecen en la frase en acusativo (-n). Hemos visto habitualmente el uso del acusativo en aquellas partes de la oración que constituyen el objeto de la frase, p.ej. "*mi manĝas fiŝon*"; también conocemos el acusativo de dirección, "*mi iras en Jaenon*". Otra situación en la que también se utiliza el acusativo se da en las expresiones temporales que miden la longitud, habitualidad o duración de algo y siempre que no se inicie con una preposición. Veamos un ejemplo:

Tri monatojn mi ĉeestis la kurson. Yo asistí al curso (durante) tres meses.

Vemos que para indicar la duración temporal de la acción que se describe en la frase usamos el acusativo (*tri monatojn*). Sin embargo si en la frase hubieramos utilizado una preposición, p.ej. "*dum*" (durante) entonces en ese caso no usaríamos el acusativo.

Dum tri monatoj mi ĉeestis la kurson. Durante tres meses yo asistí al curso.

Así que en la frase del texto se indica que algo sucedió "*longan tempon*" o lo que es lo mismo "*dum longa tempo*".

> sidinte

Recordemos que el gerundio en esperanto se forma con 3 terminaciones, usándose cada una de ellas para expresar el pasado, el presente o el futuro. Así:

- INTE*: gerundio en pasado.
- ANTE*: gerundio en presente.
- ONTE*: gerundio en futuro.

"*Sidinte*" es el gerundio en pasado del verbo "*Sidi*" (estar sentado), así que se podría traducir por "*habiendo estado sentado*". Veamos algunos ejemplos más de formas verbales de gerundio en pasado:

- *Aminte*: habiendo amado.
- *Laborinte*: habiendo trabajado.
- *Pensinte*: habiendo pensado.

> sia fratino

El pronombre "*si*" se refiere a la tercera persona, ya sea del singular o del plural, que se identifica con el sujeto de la oración. Vamos a verlo más claro con unos ejemplos:

Li donacis al mi sian libron. Él me regaló su libro.

En este ejemplo el libro pertenecía al sujeto de la oración "*li*", porque se indica "*sian libron*" y, como hemos dicho, el uso del "*si*" o en este caso del posesivo "*sia*" se refiere siempre al sujeto.

Ahora bien, veamos este otro ejemplo:

Li donacis al mi lian libron. Él me regalo su libro (pero no de él, sino de un tercero que no aparece en esta frase).

No debemos confundir "*si*" con "*ŝi*", ya que este último pronombre corresponde a "ella". Veamos más ejemplos del uso de "*sia*".

Ŝi informis al ĉiuj pri sia opinio. Ella informó a todos de su opinión.
(la opinión era la de ella, la del sujeto).

Ili alportis siajn proprajn trinkaĵojn. Ellos trajeros sus propias bebidas.
(las bebidas eran las de ellos).

Ŝi informis pri ŝia opinio. Ella informó de su opinión.
(En este caso la opinión no era la de la protagonista de la oración, sino de otra persona, también de género femenino "*ŝia*".)

> rigardis en la libron.

Hemos hablado antes del acusativo de dirección. Se usa para indicar que una acción se hace con un movimiento. En este caso podríamos pensar si "*rigardi en libron*" indica algún tipo de movimiento y podríamos llegar a una primera conclusión diciendo que no, observar algo en un libro no denota un movimiento.

Sin embargo con el uso de este acusativo de dirección, es decir de movimiento, el autor está dando a entender que la protagonista observaba algo en un libro pero a la vez se movía. Imaginemos la situación, el libro lo tiene otra persona y para que otro pueda observarlo necesita moverse para verlo. En este caso el texto dice después que "*la fratino legas*", es decir que "la hermana lee". Por lo que efectivamente la protagonista para poder observar el libro, que ella no leía, tenía que moverse.

Vemos que el acusativo de dirección añade un matiz a la acción que en nuestro idioma español no podemos expresar sino añadiendo más palabras.

> nek desegnojn nek konversaciojn.

Equivale a la estructura "ni..... ni.....". Pero a diferencia de como lo decimos en español, en esperanto no existe la doble negación. El sentido negativo en la frase no lo indica el adverbio "*ne*", sino "*nek*". Veamos algunos ejemplos:

Mi havas nek motorciklon nek aŭtomobilon.

Yo (no) tengo ni motocicleta ni automóvil.

La profesoro instruas nek historion nek gramatikon.

El profesor (no) enseña ni historia ni gramática.

> ekpripensis

Nos encontramos con la siguiente construcción:

- *Ek*: prefijo que indica "comenzar a hacer algo".

- *Pri*: preposición que significa "sobre", "acerca de".

- *Pensis*: verbo "pensar" en pasado.

Podría traducirse como "empezó a considerar". Tenemos que recordar que una preposición como "*pri*" puede unirse al verbo al que se refiere, así "*pensi pri...*" se convierte en "*pripensi...*". El objeto tras ese verbo, es decir lo que se piensa o lo que se considera, puede aparecer de diferentes maneras. Veamos algunos ejemplos:

- si lo que se piensa aparece como una frase entera, utilizaríamos la siguiente estructura:

Ŝi pripensis, ke la libro estas leginda.

Ella consideró que el libro es digno de ser leído.

- si lo que se piensa es en algo concreto, entonces usamos el acusativo.

Ŝi pripensis la aferon.

Ella consideró la cuestión.

Naturalmente, si colocamos la preposición "pri" tras el verbo y no va unida a él, entonces el objeto NO va en acusativo.

Ŝi pensis pri la afero.

Ella pensó sobre la cuestión.

> **Ŝi sentis sin**

Ya hemos visto antes que el pronombre "si" se refiere siempre al sujeto, no en vano es un pronombre reflexivo. Esta oración podría traducirse como "ella se sintió".

> **dormema**

Recordemos el sufijo "em" que lo utilizaremos cuando queramos indicar que se tiene tendencia a algo. En este caso va con el verbo "dormi" (dormir), así la oración "*Ŝi sentis sin dormema*" se traduciría como "Ella se sintió con ganas de dormir". Recuerda también que si quieres decir que tienes sueño, la traducción al esperanto sería: "*Mi estas dormema*".

> **Ŝi ekpripensis... ĉu la plezuron ... fari ĉenon valorus la laboron...**

Vamos a tratar ahora la construcción "*ĉu la plezuron*". No es la primera vez que la analizamos, porque es normal que como hispano-parlantes cometamos un error si queremos traducir directamente desde el español al esperanto.

En español utilizamos la preposición "si" tanto si hablamos de una condición, como si expresamos una duda. Veamos los siguientes ejemplos:

- Iré a tu ciudad si me pagas el viaje. (si condicional).

- No sé si iré a tu ciudad. (si que expresa duda).

En esperanto ambos "si" no se traducen siempre por "se". De este modo si queremos expresar una condición entonces utilizaremos "se", pero si expresamos una duda, entonces diremos "ĉu". Veamos algunos ejemplos:

Iré a tu ciudad **si** me pagas el viaje.
Mi iros en via urbon se vi pagas al mi la vojaĝ-kostojn.

No sé si iré a tu ciudad.
Mi ne scias ĉu mi iros en vian urbon.

Veamos más ejemplos.

SI como condición.
Li ne faros tion se vi avertas al li pri la danĝero.
Él no hará eso si le adviertes del peligro.

Studu multe se vi deziras aprobi la ekzamenon.
Estudia mucho si deseas aprobar el examen.

SI como duda.

Ni ne scias ĉu ni geedziĝos la venontan jaron.
No sabemos si nos casaremos el año que viene.

Pensu ĉu vi estas kapabla fari tion.
Piensa si eres capaz de hacer eso.

> **fari ĉenon el lekantetoj**

Se traduce como "hacer una cadena de margaritas". Ya hemos visto en anteriores ocasiones cómo se debe traducir el "de" español al esperanto, así vimos que no es lo mismo la preposición "de" cuando se refiere a una propiedad, ej. "el libro de mi amigo" que cuando se habla de una composición, "un mecanismo compuesto de engranajes", "vaso de cristal" etc.

En esta ocasión vamos a hablar de composiciones. El texto habla de una cadena (*ĉeno*) que está compuesta de margaritas. En este caso el "de" español lo debemos traducir por "*el*". Veamos algunos ejemplos de uso de la preposición "de".

DE como propiedad

La libro de mia amiko estas lektinda.
El libro de mi amigo es digno de ser leído.

La frato de mia edzino estas mia bofrato.
El hermano de mi esposa es mi cuñado.

DE como composición

Prenu la glason el kristalo por trinki vinon.
Coge el vaso de cristal para beber vino.

La libro konsistas el dudek ĉapitroj.
El libro consiste de veinte capítulos.

> **sin levi**

En este número ya hemos abordado en varias ocasiones el "si" reflexivo. Recordemos que se trata del pronombre de tercera persona, tanto de singular como de plural, que se refiere al objeto de la acción o al poseedor, ya que nunca actúa como sujeto. Veamos más ejemplos:

La muzik-bando vojaĝas per sia propra aviadilo.
El grupo de música viaja con su propio avión.

Li demandis sin ĉu la projekto estus realigebla.
El se preguntaba si el proyecto sería realizable.

En el ejemplo que proponemos "*sin levi*", se trataría del reflexivo del verbo "levi" (levantar). Así que podría traducirse por "levantarse". No debemos olvidar que también existe un sufijo específico para el reflexivo, se trata de "-iĝ", así *levi sin = leviĝi*. Se pueden utilizar ambas formas y en este caso el traductor del texto ha preferido emplear "*sin levi*".

> **tutapude**

Se traduce por "totalmente junto a". El adverbio "*tute*", como otros muchos adverbios, ej. "plene", puede unirse a la palabra a la que se refieren, perdiendo la "e" final. Las dos palabras separadas serían "*tute*" y "*apude*", con el significado de "totalmente" y "junto a". En este caso podemos unir las diciendo "*tutapude*". Recuerda que cuando dos palabras se unen la principal se coloca al final.

> **preterkuris**

Ya hemos tratado en otras ocasiones la preposición "*preter*". Su significado es "más allá", pero con la idea de que algo se mueve sin pararse respecto de un lugar. Ejemplo:

Li iris preter la monumento.
Él fue más allá del monumento (es decir pasó de largo)

En el ejemplo que proponemos "*preterkuris*" da la idea de que alguien, en este caso "*la blanka kuniklo*" corrió pasando de largo, sin detenerse.



Guadix (prononcu: *Güadiks'*) estas belega vilaĝo meze de la provinco Granado. Tie troviĝis iberaj restaĵoj, inter ili endomaj fornoj kaj malgrandaj siloj. Post hazardaj fosadoj aperis ankaŭ kelkaj ĉambroj kun muroj el adobo. Ĉi ĉio pruvas, ke sur ĉi tiu loko troviĝis antikva kaj grava setlejo.

Laŭdire, la imperiestro Julio Cezaro fondis tie kolonion por la eksaj militistoj de la legioj *Gemina* kaj *Vernacula*, eble ĉirkaŭ la jaro 45 a.K. La nova urbo ricevis la nomon *Julia Gemella Acci*.

Blazono de Guadix



Pri la graveco de la romia kolonio estas necese diri, ke oni trovis monerojn stampitajn en Guadix de la imperiestroj Aŭgusto, Tiberio, Kaligulo kaj Klaŭdio. Sendube Acci, jen la pli konata romia nomo de la urbo, estis grava komerca nodo en la zono. Lastatempe oni trovis restaĵojn de romia teatro, akvujoj kaj eĉ termo.

Kiam islamanoj alvenis en la Iberan Duoninsulon komence de la 8-a jarcento, la urbo ricevis la nomon *Wadi Ash*, origino de la nuntempa Guadix. Laŭ tiutempaj kronikistoj la urbo ne estis tute fidela al la kordova kalifo, tiel okazis oftaj ribeloj kontraŭ la povo de la omeja dinastio. Kiam la kordova kalifejo malaperis, Guadix troviĝis meze de la islamaj regnolandoj de Granado kaj Almerio, en la jaro 1145 Ahmad Ibn Malham establis sendependan regnon en Guadix kaj en la apuda urbo Baza. Fine, la urbo integriĝis al regnolando Granado, de la nazara dinastio.

En la jaro 1362 okazis en Guadix grava batalo inter granadanoj kaj kastilianoj, kiuj restis venkitaj. Tamen, post internaj luktoj en la

granada regnolando oni faciligis la konkeron de la urbo fare de la kastiliaj trupoj. Tiam *Wadi Ash* fariĝis Guadix.

En la jaro 1490 islamanoj kaj judoj klopodis ataki la kastilian fortreson de la urbon, tamen ili ne sukcesis kaj tiam ĉiuj islamanoj estis devige metitaj en la nomata "Kvartalo de la Maŭroj", nuntempe konata kiel kvartalo de Sankta Ana.

Iom post iom Guadix kristaniĝis. Multaj el la mallarĝaj stratoj malaperis kaj oni konstruis meze de la urbo grandan placon, tie loĝis la aŭtoritatoj. En la jaro 1492 la moskeo fariĝis kristana katedralo.



Okaze de la ribelo de maŭridoĵ kontraŭ la hispana reĝo en la jaro 1568, oni forpelis ĉiujn islamanoj, tamen multaj el ili kaŝite revenis en la urbon. Laŭdire ili traboris apudan monton kaj tie ili loĝis ene de kavernoj.

Dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj Guadix fariĝis grava urbo, ĉefe pro la tiea ekzisto de episkopa sidejo. Ĉirkaŭ la katedralo stariĝis gravaj lernejoj kaj tio ebligis la alvenon de junaj homoj kun la celo studi en tiuj prestiĝaj kultur-centroj.

La napoleona invado, en la komenco de la 19-a jarcento, estis terura kaj tio faciligis la dekadencan de la urbo. En tiu tempo la ĉefa ekonomia resurso estis la ter-kulturado, ĉefe la produktado de tritiko kaj alfo. En la jaro 1895 oni konstruis fervoj-linion inter Linares kaj Almerio. Ekstere de Guadix oni konstruis stacidomon, tiel la urbo fariĝis grava komunik-nodo inter Granada, Almerio, Murcio kaj Linares.

Komence de la 20-a jarcento oni konstruis du grandajn suker-fabrikejojn, surbaze de la suker-betoj tie kultivataj. Same, kelkaj farun-fabrikejoj troviĝis tie. Nuntempe Guadix estas grava urbo kie 20.000 homoj loĝas, kaj kies ĉefa vivrimedo estas la terkulturado. Subteraj akvofluoj ebligas la produktadon de hordeo, sun-floroj, olivarboj kaj migdalarboj. Guadix ankaŭ estas tre konata turisma urbo, dank'al la luado de kaverno-domoj tie ekzistantaj.



Monumentoj

La Katedralo.-

Kiel dirite, kvankam Guadix ne estas provinca ĉefurbo, ĝi estas episkopa sidejo. En la jaro 1492 la tiama islama moskeo fariĝis kristana katedralo, sub la patroneco de la Enkarnigado de Kristo. Post kelkaj jardekoj oni rekonstruis la katedralon, inter la jarcentoj 16-a kaj 18-a, pro tio estas videblaj kelkaj arkitekturaj stiloj, kvankam la plej videblaj ornamaĵoj estas barokaj.

La Palacio Villalegre.-

La nobela familio Fernández de Córdoba konstruis palacon, ĝuste sur alia kiu apartenis al la sekretario de la plej prestiĝa maŭrido en la urbo. Tamen, post la ribelo de la islamanoj, kiuj devige estis baptitaj, en la jaro 1568, ĉiuj iliaj proprietajoj estis trapasitaj al nobelaj kristanaj familioj. Post kelkaj administraciaj utiloj dum jarcentoj, nuntempe ĉe ĝi situas la municipa supera muzik-lernejo.

La Fortreso.-

Konstruita dum la 11-a jarcento de la islamanoj, ĝi situas sur la plej alta zono en la urbo. Kiel milita konstruaĵo

ĝi utilis por defendi la urbon kaj poste kiel rezidejo por la reĝoj.



La Kaverno-domoj.-

Sendube temas pri la plej konata allogaĵo de Guadix. En ĉi tiu urbo ekzistas kvartalo kies "konstruaĵoj" reale estas domoj ene de traboritaj montetoj, tio estas, ili estas kaverno-domoj. Ili estis konstruitaj de la islamanoj kiuj restis en la urbo post la konkero fare de la kastiliaj trupoj.

Laŭdire ne ekzistas pli komforta domo ol tiuj konstruitaj ene de kaverno. La temperaturo estas konstanta, inter 18 kaj 20 gradoj, ili havas ĉiajn eblajn komfortaĵojn kiuj povas esti trovataj ankaŭ en "normalaj domoj". Nuntempe pli ol kvar mil

En Guadix naskiĝis en la jaro 1844 José Rodríguez Huertas, konsiderata kiel la unua hispana esperantisto. Li estis instruisto en Malago kaj tie li fondis la unuan E-grupon en Hispanio, kiu siafoje estis la 5-a en la mondo. Li estas la aŭtoro de la unua lerno-libro pri Esperanto por hispan-lingvanoj, eldonita en 1890.

homoj loĝas en la "kvartalo de la kaverno-domoj", tie la elirantaj fumtuboj estas konata pejzaĝo en tiu zono.

aŭtoritatuloj de la apuda vilaĝo Baza plendis pri tio, ili konsideris, ke se la bildo estis trovita en Baza, ĝi devus



Festoj

La 17-a de januaro okazas la festo de Sankta Anton. La antaŭa nokto oni bruligas fajrojn sur-strate. Dum la mateno de la 17-a de januaro, ornamitaj ĉaroj kaj ĉevaloj iras sepefoje ĉirkaŭ la preĝejon de tiu sanktulo.

La 9-a de septembro okazas la plej konata festo en Guadix, kvankam ĝi ankaŭ rilatas al la apuda vilaĝo Baza. Oni diras, ke meze de la 15-a jarcento masonisto trovis ene de antikva araba templo bildon de la Virgulino Maria, kaŝita tie de la 12-a jarcento. Kvankam la templo troviĝis en Baza la masonisto decidis porti la religian bildon en Guadix, ĉar tie li loĝis. La

resti tie. Post kelkaj jaroj da disputoj kaj plendoj, oni decidis, ke se iufoje homo veninta de Baza povus eniri en la preĝejon de la Merced, tute pura, li povus porti la bildon denove en tiun vilaĝon.

Tiel, ĉiu 9-a de septembro, homo veninta de Baza, vestita per bufonaj vestaĵoj eniras en Guadix por "rabi" la bildon de la Virgulino. La celo de la enloĝantaro de Guadix estas malpurigi la vestaĵojn de tiu homo, kiu populare estas konata kiel "*Cascamorras*".

Dum la unua semajnfino de la monato majo okazas la Tago de la Kruco, tipa festo en la provinco Granada. Dum ĝi oni starigas krucojn 31

faritaj per floroj surstrate. Ĉirkaŭ la krucoj okazas festoj.

Gastronomio

Estas tre konataj la viandaĵoj ellaboritaj en Guadix. Tradicie, ili estis ellaboritaj de la familioj mem dum Kristnasko aŭ okaze de la festo de Sankta Anton, meze de januaro.

Bongustaj estas la kaprido, la stufaĵo de Sankta Anton kaj la "rinran" (kuirajo kun terpomoj, moruo kaj kapsiko).

Se paroli pri desertoj estas bongustaj la kustardo kaj la frititaj ringaj kuketoj.

Alie, la persikoj kultivataj en Guadix estas konataj en la tuta mondo.



Venontnumere Turismi en ... FUENTE OBEJUNA (Kordovo)





Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.


Ramón Fernández Jurado La almeria elmigrinto en Katalunion

Ramón Fernández Jurado naskiĝis en Almerio en la jaro 1914. Ankoraŭ infan-aĝe lia familio elmigris en Katalunion, ĝuste en Barcelonon, laŭ la sama vojo trairota de miloj da andaluzoj dum la venontaj jardekoj. Tie li laboris kiel lignaĵisto.

Li baldaŭ havis sociajn kaj politikajn fervorojn, tiel li ekagadis en la anarkisma sindikato CNT, sed tuj li transiris en la socialisman UGT. En la jaro 1931, okaze de la proklamo de la respubliko en Hispanio, li aliĝis al la Laborista kaj Kamparana Bloko kaj al la Komunisma Iberia Junularo.

En la jaro 1932 li ĉeestis kurson de la internacia lingvo en la Kooperativo de Man-teksistoj de Barcelono kaj kelkajn jarojn poste, inter 1933 kaj 1935, li mem gvidis kursojn en pluraj esperanto-grupoj. En 1935, dum sia milit-servo, li aliĝis al la Kontraŭ-faŝisma Respublika Militista Unio, pro tio li estis enkarcerigita.

Kiam la civila milito ekis en Hispanio li estis membro de la Laborista Partio de Marksisma



Ramón Fernández Jurado
Almerio, 1914
Barcelono, 1984

Unuigo, rezulto de la kunfandiĝo de la Laborista kaj Kamparana Bloko kaj de Komunisma Maldekstro de Hispanio. Kiel membro de ĉi tiu grupo li partoprenis en surstrata batalado en la urbo Barcelono, dum la unuaj tagoj de la milito. Ene de la milicoj de la partio POUM li atingis la rangon de majoro dum kombatoj en la fronto de Aragono.

Dum la milito li estis vundita kaj poste kaptita de la frankisma armeo. Li estis kondamnita al 30 jaroj da malliberigo. Li restis en la karcero de Barcelono ĝis la jaro 1942, ene de la malliberejo li ankaŭ instruis esperanton.

Kiam li eliris el la prizono li klopodis reaktivi kaŝite la komunisman partion POUM. En 1949 li eziliĝis al Francio kaj de tie, li iris al Santjago de Ĉilio. Tie li kunlaboris kun la revivigo de la ĉilia Esperanto-movado.

En la jaro 1964 li revenis en Hispanion. En tiu jaro li kunlaboris kun la kooperativo de man-tekstoj de Barcelono. Li ankaŭ verkis en la hispana, en la kataluna kaj en esperanto. En la Esperanto-movado li estis membro de la juĝ-komisiono de la internaciaj floraj ludoj. Dum la 7-a jardeko li denove klopodis reorganizi la partion POUM, sed en 1976 li transiris al socialisma partio, li estis membro de la kataluna komitato de ĉi tiu partio.

Li estis elektita skabeno pri kulturo en la urbodomo de Castelldefels en la jaro 1983 kaj deputito de la Kataluna Parlamento en 1984. En tiu jaro, 1984, li forpasis.

En la jaro 1987 aperis lia katalunlingva libro "*Memòries d'un militant obrer 1930-1942*" (Memoroj de laborista luktanto 1930-1942).

Nuntempe la plej grava kultura centro kaj biblioteko de Castelldefells nomiĝas "*Ramón Fernández Jurado*". Okaze de la inaŭguro en la jaro 2015 ĉeestis elstaraj katalunaj intelektuloj, kiel la kantisto Joan Manuel Serrat, kiu bone konis nian almerian samideanon. Ĝuste nun, en 2023, la urbodomo de Castelldefels ekigis proceson por deklari lin "*adoptitan filon de la urbo*".

En la jaro 1988 Jacint Reventós verkis la libron "*Ramón Fernández Jurado o l'epopeia de la immigració*". (Ramón Fernández Jurado aŭ la epopeo de la enmigrado).





$$E = mc^2$$

Scienca Angulo

En la spaco vid-kapablo malpliboniĝas


Sciante, ke kiam astronautoj restas dum kelke da tempo en loko sen gravito, la staturo pligrandiĝas. Tio suldiĝas al la fakto, ke la spacoj inter vertebro malfermiĝas, do astronautoj estas pli altaj kiam ili revenas el spaco-vojaĝo. Ĉi tio ankaŭ povas okazigi dors-dolorojn.

Nun, post esploroj sciencistoj trovis novajn fizikajn problemojn, kiam homo estas dum kelke da tempo en la spaco. La vid-kapablo de astronautoj plimalboniĝas. Kial?

Doktoro Noam Alperin, de la Universitato de Miamo, mezuris la kvanton de rakia likvo ekzistanta en la astronautoj post reveni el spaco. La doktoro trovis, ke tiuj kosmonaŭtoj kiuj restis en la spaco dum multe da tempo, ĉirkaŭ ses monatoj, havis multe pli da rakia likvo ĉirkaŭ la okul-globoj ol tiuj kiuj resti tie nur dum kelkaj semajnoj. Tiu rakia likvo amasigita ĉe la dorsa parto de la okulo provokis ĝian premon.

Laŭ la doktoro, sen la influo de gravito la rakia likvo ne dismetas sin egale tra la cerbo, male, ĝi koncentriĝis ĉe la okul-globo. La forta premo de tiu likvo damnas la vid-kapablon de homoj. Ĉi tiu problemo ĵus ricevis nomon "Sindromo de vid-malkapableco pro interkrania premo". D-ro Alperin asertis ankaŭ, ke la formo de la kranioj povas modifi tiun problemon, pro la fakto, ke kelkaj astronautoj apenaŭ suferis tiun sindromon. Tamen, laŭ la doktoro, se iu restas sen gravito dum sufiĉe longa tempo, la vid-kapablo sendube malpliboniĝos.

LA OKUL-GLOBO





Flamenko

Alonso Nuñez "RANCAPINO"

Alonso Nuñez Nuñez naskiĝis en la vilaĝo Chiclana de la Frontera, en la provinco Kadizo, en la jaro 1945. Li apartenis al cigana familio kie la flamenka arto envolvis ĉion. Li estas nepo de *Tía Antonia "La Obispa"*, filo de *"Orillito"* kaj frato de *"Orillo"*. Li mem rakontis, ke dum sia infan-aĝo li iris de unu loko en alian tute nuda kaj pro tio li ricevis sian unuan almonon *"Pino Quemao"*. Tiu kromnomo poste ŝanĝiĝis al *Rancapino*, pere de kiu li estas tre bone konata en la flamenka mondo.

Jun-aĝe li ofte akompanis al sia bona amiko, José Monge Cruz, la fama *Camarón de la Isla*. Ili vizitis ade la trinkejon *"Venta de Vargas"* en San Fernando (Kadizo). Tie renkontiĝis entuziasmoj de la flamenka kantado, kiuj estis pretaj pagi por aŭskulti tiujn kiuj komencis ludi en ĉi tiu arto.

Li komencis en popularaj festivaloj kaj en flamenkaj spektakloj. Lia kantado estas tre pura, li admiras la stilon de Manolo Caracol. Laŭ fakuloj pri flamenko, *Rancapino* transmitas facile siajn sentojn en la koron de la aŭskultantoj.



En la jaro 1977 li atingis gravan premion en la Nacia Konkurso de Flamenka Arto de Kordovo. Li diskonigis sian kantadon en la tuta Hispanio kaj ankaŭ en Eŭropo, Usono kaj Japanio. Tamen, li ne surbendigis multajn diskojn, nur du, la unua en la jaro 1996 kaj alia en 1997.

Muzik-fakuloj asertas, ke *Rancapino* posedas specialan talenton por ludi siguiriojn, solearojn kaj malagajn kantaĵojn, kvankam ene de lia ampleksa repertuaro tarantoj ludas specialan rolon.

Jen traduko en esperanton de fama solearojn de *Rancapino*.

Malbenas mi la horon

*Malbenas mi la horon
kiam mi atentis pri vi,
kiam mi atentis pri vi,
kiam mi atentis pri vi.*

*Tiam mi devis morti,
ĝuste kiam mi konis vin.
Tiam mi devis morti,
ĝuste kiam mi konis vin.*

*Kiom vetas vi
ke en vian pordon mi iros
kaj tien vi ne povos eniri.
Kara ciganin'
tien vi ne povos eniri.*

*Mi iluziojn al mi faras
sed tuj poste kolere,
mian ĉemizon mi disbatas.
Sed tuj poste kolere,
mian ĉemizon mi disbatas.*

*Venu ciganin'
venu kun mi
Al Chiclana iras mi.*

Estas eble aŭskulti jenan kantaĵon ĉe:
<https://www.youtube.com/watch?v=XztJLO87n5U>



Camarón de la Isla kaj Rancapino



Fervojista Angulo

La krimoj de la Ekspresa Trajno de Andaluzio en 1924

Fervojoj kaj vagonaroj elstariĝas dum la lastaj jarcentoj se oni parolas pri grandaj konstruaĵoj aŭ pri geografiaj limoj atingitaj. Tamen, oni devas agnoski, ke ili ankaŭ estis celoj de deliktuloj, ĉi tio ja estas konstanta temo en multaj filmoj.

Sendube la plej grava delikto rilate vagonarojn okazinta en Hispanio, estis tiu de la jaro 1924, ĝi okazis en la ekspresa trajno de Andaluzio. Kio vere okazis? Jen la tuta rakonto.

José María Sánchez Navarrete estis konata diboĉulo en Madrido. Li apartenis al elstara familio, tamen li enŝuldiĝis pro sia emo ludi kartojn. Dum nokta festo li konis al José Donday, kubano. Ili enamiĝis kaj ekigis sekretan rilaton, tiutempe samseksemo estis tute malpermesita.

Donday proponis al Sánchez Navarrete plenumi facilan rabon por atingi monon kaj tiel solvi definitive liajn ekonomiajn malfacilaĵojn. Ili kalkulis la atingon de unu miliono da pesetoj. Tamen, ili nur estis altklasaj dandoj, tute ne agemuloj, do, ili kontaktis kun Honorio Sánchez, konata de ili okaze de siaj noktaj festoj. Honorio ankaŭ bezonis monon, krome li movis sin lerte ĉe la plej malbonaj kvartaloj. Li, siafoje, kontaktis kun sia amiko Antonio Teruel, kiu travivis seriozajn ekonomiajn problemojn. Fine li kontaktis ankaŭ kun Francisco Piqueras, konata kiel *Paco el Fonda*, aĉulo ne tre rekomendinda.

Tiamaj ĵurnaloj abunde informis pri la novaĵo. La fotografaĵo montras la momenton, kiam fervojistoj kaj civil-gvardioj demetis la korpojn de la murditoj.



Kunigitaj ĉiuj ili, José María Sánchez sciigis pri sia definitiva agadplano, tre facile realigebla laŭ li. Dum kelke da tempo li laboris en fervoja kompanio kaj li sciis, ke vendrede la ekspresa trajno de Andaluzio transportis grandan kvanton da mono en la poŝta vagonaro. La mono utilis por pagi semajnajn salajrojn.

kaj do, li aĉetis nenion. Kompreneble li diris nenion pri tio al siaj fikunuloj. Male, li havigis al ili brand-botelon, kun multe da alkoholo sed kun neniu narkotaĵo ene de ĝi.

La 11-an de aprilo 1924 ĉiuj komplikoj, escepte Donday kaj Honorio Sánchez, envagoniĝis en la



Jen ĉiuj kulpintoj de la krimoj de la Ekspresa Trajno de Andaluzio en la jaro 1924

José María Sánchez konis unu el la oficisto vojaĝanta en la poŝtovagono, Ángel Ors. Laŭ la plano, Sánchez vizitus lin ene de la vagono, akompanita de siaj komplikoj. Tie ĉiuj trinkus alkoholaĵon, unue Sánchez metus narkotaĵon en la glasojn de la poŝtoficistoj.

Sed la agadplano ne komenciĝis bone. Sánchez Navarrete havigis monon al Donday por aĉeti la narkotaĵon, tamen ĉi lasta ulo preferis ludi kartojn per tiu mono. Kompreneble li perdis la tutan monon

stacidomo de Aranjuez (Madrido). José María Sánchez iris en la poŝtovagonon akompanita de Antonio Teruel kaj Paco el Fonda. Ángel Ors, eksa kunulo de Sánchez malfermis la pordon de la vagono kaj ĉiuj eniris. Sánchez regalis la poŝtoficistojn per la brand-botelo, kiu supozeble estis plena je narkotaĵoj por dormigi ilin. Sed, kiel dirite, nur temis pri simpla alkohola trinkaĵo.

Teruel kaj el Fonda baldaŭ eknervoziĝis ĉar la oficistoj ne perdis sian konscion. Do, ili decidis krule

batadi ilin pere de granda tenajlo. Ángel Ors estis korpulenta, do li sukcese luktis kontraŭ la rabistoj, kiuj fine mortigis lin per du pafoj. Apud la mortintaj poŝtovicistoj la rabistoj komencis preni la monon el la sakoj, tamen la rezulto ne estis tre fruktodona ĉar ne tro multe da mono estis transportita en tiu vojaĝo.

Sánchez riproĉe admonis la murdistojn, li ne komprenis la bezonon mortigi la oficistojn. La respondo estis tre simpla, neniu atestanto kapabla identigi ilin povus resti viva.



Paco "El Fonda" arestita de la civil-gvardio

Ĉiuj ili elvagoniĝis en la urbo Alcázar de San Juan. Tie troviĝis Donday, konata ankaŭ kiel "El Pildorita" (La Piloruleto) pro sia drog-dependenco.

Por reveni en Madridon ili uzis taksion. La ekspresa trajno sekvis sian vojon. En unu el la stacidomoj oficisto de la loka poŝtejo klopodis kontakti kun la poŝto-vagono, neniu respondis kaj neniu lumo videblis ene de la vagono. Li suspektis kaj rapide kontaktis telegrafie kun la stacidomo de Kordovo, la proksima halto-loko de la vagonaro.

Kiam la trajno alvenis en Kordovon, civil-gvardioj malfermis la poŝto-vagonon kaj tie troviĝis du kadavroj kaj la restaĵojn de perforta rabo. Policianoj agadis tuj ĉar jam la 12-a de aprilo, tio estas nur unu tago poste, ĉiuj deliktuloj estis arestitaj.

Kiel dirite, rabistoj ne estis tre lertaj, en sia reveno en Madridon ili altiris la atenton de kelkaj nokt-gardistoj kiuj surpriziĝis ĉe tiuj du elegantaj dandoj akompanitaj de kelkaj aĉuloj. Policianoj eniris en la domon de Antonio Teruel, en tiu momento li decidis memmortigi sin per pafo. Poste oni arestis al José María Sánchez, lia patro estis altranga civil-gvardio kiu ne kapablis kredi tion kio okazis. Paco el Fonda prenis trajnon por forfuĝi en Portugalion, tamen li estis baldaŭ arestita. Honorio Sánchez, kiu vere ne partoprenis en la rabo ankaŭ estis arestita. Donday sukcese forfuĝis en Parizon, tamen franca polico arestis lin kaj li estis baldaŭ ekstradiciita en Hispanion.

Ĉi kvar krimuloj estis juĝataj en milit-proceso, verdire la generalo

Primo de Rivera, tiutempa diktadoro en Hispanio, deziris montri, ke oni akceptus neniun teroran agadon en la lando. La advokatoj kulpis al Teruel, kiu antaŭe memmortigis sin.

Fine la tribunalo aprobis tri mortkondamnojn al José María Sánchez, Honorio Sánchez kaj Paco el Fonda. Ĉiuj ili estis ekzekutitaj per garoto. La kuba Donday estis kondamnita al 20 jaroj da mallibereco, li mortis en la jaro 1978.

nun ni

junulara paĝo

JUGAR AL PÁDEL - LUDI PADELON

Hola buenas, soy Daniel Mata de 1º de Bachillerato C, y os voy a hablar sobre cómo el pádel puede ayudar a la difusión del esperanto, así como el esperanto puede mejorar el pádel a nivel mundial.

Me gustaría empezar hablando sobre cómo el esperanto podría ayudar al pádel. Desde mi punto de vista creo que a partir del pádel podemos crear una comunidad sobre el esperanto, ya que a través del esperanto podríamos comunicarnos con gente de otros países, para así internacionalizar el pádel y el esperanto.

De esta forma los jugadores de pádel también podemos conocer a personas de otros lugares, así como de otros países, comunicándonos con el esperanto sin la necesidad de aprender nuevos idiomas, ya que podríamos comunicarnos con quien quisiéramos.

Yo creo que esto se podría difundir a través de alguna aplicación para que los jugadores de pádel se puedan comunicar a través de la misma, sin entender de países, ni fronteras. Esta aplicación nos podría aportar también información deportiva de los jugadores, como nacionalidad, nivel, edad, entre otros.

Volviendo a los beneficios, esto podría hacer que muchos jugadores aprendan esperanto para relacionarse con otros jugadores y de esta forma promocionar el esperanto y que más gente lo aprenda.

Así, a su vez, muchos actuales hablantes de esperanto podrían empezar a practicar pádel o simplemente empezar a conocer este fantástico deporte. Además del pádel se podría hacer en la mayoría de deportes que son practicados alrededor del mundo. Yo lo he hecho del pádel porque es un deporte que no es violento, además de que es el deporte que practico.



Padelo estas sporto ludata per rakedo kaj pilko. Ĝi estas ĉefe ludata kun kvar ludantoj, kie pilko, simila al tenispilko, devas esti ludita per rakedo trans reto.



Pilko

Rakedo



Nostalgio

En tiu momento li povis vidi la spaco-stacion. Ĝi ŝvebis en la aero kiel stranga sav-boato meze de la nigra spaco. Li vidis la ekflugan platformon, tie li mem kaj lia bona amiko Laŭro Ardslej komencis la unuan vojaĝon de la homaro en Marson. Fone aperis la Tero, lia hejmo...

Post malmulte da tempo, tre baldaŭ mia kara Lin. Se vi povus scii pri kio mi revas nun.



Jes, David revenis hejmen, en la hejmon de Lin Ardslej, la edzino de sia kara amiko Laŭro. Sed li mortis, nun ŝi estas vivdino.

Atentu, spaco-stacio! Jen kolonelo David Tod ene de raketo X-2. Atentu spaca raketo X-2 eniras nun en la spaco-stacion.



David uzis la komunikilon de la spaca raketo. Li klopodis kontakti kun la stacio. Li arde deziris renkontiĝi kun Lin, sia kara Lin. Li memoris kiam li planis murdis sian amikon.

Li neniam divorcos de vi. Laŭro neniam forlasus vin. Sed en Marso povas okazi multaj aferoj.

Mia kara David, mi estas timema, li povus suspekti ion.



Li neniam suspektos, ke ni enamigiĝis. Ni estos prudentaj.

David, mi ne povas atendi ĝis via reveno. Mi diros al li, ke mi ne amas lin. Tiel, mi divorcos kiel eble plej baldaŭ.

Ne, ne diru tion al li. Vi scias, ke Laŭro estas tre orgojla. Li ne divorcos. Lasu min agi aliel.

Pri kio vi pensis, David? Kion vi faros?

Mi diros al ĉiuj, ke Laŭro malsaniĝis en Marso. Tie li mortis.

Estontece, pliaj spaco-ŝipoj iros en Marson. Ĉu ili ne trovos la korpon de Laŭro?



David ekmemoris tiujn vizitojn al la spaco-stacio por prepari la vojaĝon en Marson.

Ĉio jam estas preta.

Unu plia semajno kaj ni estos sur la vojo.

Oni konstruis la spaco-stacion antaŭ deko da jaroj kun la ĉefa celo ebligi vojaĝojn al foraj planedoj. Oni piedpremis Lunon antaŭ multaj jardekoj, nun estis la ŝanco vojaĝi en Marson.



Laŭro, David. Morgaŭ estos la "granda tago". Vi atingos Marson proksimume post 5 monatoj.

Vi restos en konstanta komunikado kun ni. Vi informos al ni pri ĉio esplorata, pri ĉiuj eblaj problemoj. Ne risku! Se vi troviĝas en danĝero revenu ĉi tien kiel eble plej baldaŭ! Fotografu ĉion. Esploru ĉion kaj jen mia lasta eldiraĵo: Bonan ŝancon!

Dankon

Dum la lasta nokto sur la Tero, Laŭro, David kaj Lin trinkis toste la sukceson de la vojaĝo. Sed Laŭro ne sciis, ke David kaj Lin deziris atingi alian sukceson post la vojaĝo.

Ni revenos baldaŭ, tiam ni denoveostos.

Sukceson!

Mi serĉos pliajn glaciaĵojn en la kuirejo.



Kaj en tiuj kurtaj momentoj, kiam Laŭro eliris el la ĉambro

Mia kara Lin, mi revenos kaj vi estos libera.
David, mi estos brakumu min !



Tiumatene, Lin kisis Laŭron sed ŝi sopiris al David.

Ĝis kara!

Ĝis! Revenu baldaŭ!



Kaj dum tiu lasta vojaĝo en la spaco-stacion...

Laŭro, vi lasas ĉarman edzinon en la Tero.

Jes, certe!



En la spaco-stacio ĉio estis preta por lanĉi la spaco-ŝipon en la planedon Marson.

Koloneloj David Tod kaj Laŭro Ardsley jam estas ene.

Nu, ĝis baldaŭ amikoj!

Ĝis la !

Post unu jaro vi revenos.



La retrokalkulo ŝajnis eterna ĝis kiam...

Ni forpaŝigas!!!!



La vojaĝo daŭris kvin monatojn, dum la tuta tempo David nur pensis pri Lin kaj pri la momento kiam ili renkontiĝos libere.

David, jen Marso.

Tenu vin, Laŭro. Ni ĵus eniris en la gravitan kampon de Marso.



La spaco-ŝipo malrapide kaj milde surmarsigis.

Jen ni !

Malrapide.



Jam en Marso, silento envolvis ĉion.

Atentu spaco-stacio! Jen la spaco-ŝipo X-2. Ni jam estas sur Marso.

Informu pri la atmosfero, la temperaturo, la gravito...



Ili informis pri centoj da datenoj

Kaj nun, Ardsley kaj mi eliros el la spaco-ŝipo. Ni surpaŝos la marsan grundon. Ni uzos niajn kosmo-vestojn.

Ĉio estas preta por eliri. Jen la momento!



Tiam, ili surpaŝis la rugan kaj polvoplenan marsan grundon.

Mi fotografias ĉion. Nun ni demetos niajn kaskojn.

Jes!



La momento ĵus alvenis. David prenis sian armilon kaj ...

Ho! Ĉi tiuj montoj similas al tiuj de la Tero. Ha! David kial vi prenas vian armilon ?

La armilon mi uzos kontraŭ vin.



David vidis la mirfrapitan vizaĝon de sia kunulo Laŭro

ĝuste kiam flava lum-radio eliris el la armilo kaj Laŭro falis malsupren.

kaj la sono de tiu pafado eĉe repetiĝis de unu monto en alian.



Laŭro, Lin apartenas al mi. Nur al mi.



Tiam David entombigis Laŭron en sensignala tombo.



Poste, li informis

Jen kolonelo Tod. Ardsley ne fartas bone. Ni ambaŭ demetis niajn kaskojn kiam ni eliris.



Post kelkaj tagoj

Medikamentoj ne utilas, li fartas ege malbone.



Fine...

Kolonelo Ardslej ĵus forpasis. Lia lasta deziro estis ripozi eterne en la spaco. Mi revenas hejmen. Mi ĵetos lian korpon en la spacon dum mia reven-vojaĝo.



Atentu, spaco-stacio! Jen kolonelo Tod mi revenas. Kial vi ne kontestas min?



Silento estis la sola respondo kiun kolonelo Tod ricevis el la spaco-stacio.

Lasta kvanto da energio de la ŝipo X--2 estis uzata por eniri en la spaco-stacion.

Atentu! Mi revenas.



Preparu jam la ŝipon por iri en la Teron, amikoj!



Tomba silento envolvis la spaco-stacion.
Neniu respondo alvenis. Neniu estis tie.

David Tod descendis al la spaco-stacio.

Kie vi estas? Kien vi foriris? Kie
estas la transportilo por iri en
la Teron?

Mi estas ĉi tie! Ĉu vi ne vidas min?
Kio okazis?



Tuj raŭka voĉo eliris el aŭtomata komunikilo.

Kolonelo Tod, jen generalo Mir de la
Milita San-servo. Mi devas informi al vi
ke...

laŭ vi diris, kolonelo Ardslej mortis pro
malsano kiu ne povis esti solvita de niaj
medikamentoj. Evidente, vi estis tuj apud li
kaj pro tio ekzistas la risko ke tiu malsano
de la planedo Marso trafis vin. Tiel,
ni ne povas riski



meti la tutan homaron en tiu danĝero,
ĉar tio povus provoki la tujan malaperon
de la enloĝantaro de nia planedo.

Generalo Mir fine ordonis...

Pro tio, estas mia devo informi al vi, ke vi
devos resti en la spaco-stacio por ĉiam. Tie
vi trovos sufiĉe da manĝaĵoj.



Sed David Tod ne priatentis la lastajn vortojn
de la generalo Mir. Li deziris morti.



Andaluza Kuirarto

Ovoj laŭ la monaĥa stilo

En la jaro 1812 la urbo Kadizo estis tute ĉirkaŭigita de la napoleonaj trupoj. Ĝi estis la sola loko kiu rezistis la francan invadon de la hispana teritorio en la Ibera Duoninsulo. Kompreneble, multaj freŝaj manĝaĵoj mankis dum tiu sieĝo, sed kiel dirite "neceseco pliigas la lertecon", do, estis necese trovi anstataŭojn por la kutimaj, sed ne troveblaj, manĝaĵoj.

Unu el ili estis la ovoĵoj. Tiam, kapucena monaĥo havis grandiozan ideon, anstataŭi ovojn per muelitaj kikeroj. Tiel, la tuta monaĥaro povus manĝi sufiĉe bone dum tiuj teruraj tagoj. Depost tiam, tiu recepto estas konata kiel "ovoĵoj je la monaĥa stilo". Kompreneble ovoĵoj tute mankas en la recepto.

Tiu antikva monaĥo mem devis mueli la kikerojn, feliĉe nuntempe estas eble trovi en preskaŭ ĉiuj vendejoj faruno de kikeroj.

Jen la ingrediencoj por du homoj:

- Faruno de kikeroj, unu glaso.
- Akvo, unu glaso kaj duono.
- Salo.
- Vinagro.
- Oliv-oleo.
- Malgranda cepo.
- Petroselo.



Salo



Vinagro



Oliv-oleo



Cepo



Akvo



Petroselo



Kikeroj.
Ili devas esti muelitaj, kiel faruno.

Kaj jen la preparado:

1) Metu la farunon de kikeroj, la salon kaj la akvon ene de potoj. Ŝutu ĉi tiujn ingredientojn ĝis la atingo de pasto sen grumeloj.



2) Varmigu la paston, ĝis kiam ĝi ekbolas. Dum la kuirado ne ĉesu ŝuti la paston, uzu por tio lignan kuleron. Post la ekbolo, malpliigu la varmon en la kuirejo. Denove, ne ĉesu ŝuti ĝin ĉar ni devas eviti ke la pasto restos algluita al la potoj. La fina rezulto devas esti simila al beŝamelo. Gustumu ĝin, se necese aldonu iom da salo.



3) Metu la paston ene de kvadrata aŭ rektangula muldilo. Sub la pasto metu unue ne-adhereblan paperon. Malvarmigu ĝin ene de fridujo dum du horoj.

4) Post du horoj tranĉu la paston laŭ malgrandaj kvadratoj. Estus necese unue oleumi la tranĉilon, por pli facile atingi bonan tranĉadon.



5) Fine, haketu la cepon kaj aldonu petroselon sur tiujn kvadratetojn. Verŝu oliv-oleon kaj vinagron. Se necese aldonu iom da salo.



BONAN APETITON !

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La strato de la kvin buloj en Malago

En la urbo Malago ekzistas mallarĝa strateto ornamita de kvin diverskoloraj buloj formantaj krucon. La nomo de la strato estas ĝuste tiu, "Strato de la kvin buloj". Kiel dirite, ĝi estas ege mallarĝa, apenaŭ du metroj, do, la etoso estas freŝa en somero kaj dumvintre la vento ne trakuras ĝin.

Kion signifas tiuj kvin buloj? Unue, estas necese diri, ke ekzistas diversaj kaj malsimilaj klarigoj rilate ĉi tiun ornamaĵon. La buloj verŝajne estas kanon-buloj de 155 m-moj de diametra kalibro, uzitaj de la trupoj de la katolikaj gereĝoj dum la konkero de la urbo en la jaro 1487. Do, kelkaj historiistoj asertas, ke temas pri memoraĵo de tiu lukto kaj omaĝo al la venko de la kristanaj trupoj. Pro tio, la kvin kanon-buloj formas krucon kaj ili troviĝas sur la muro de preĝejo.

Alia teorio pri la deveno de tiuj kvin buloj baziĝas sur la fakto, ke ĝuste en tiu strateto stariĝis mezepoke monaĥinejo, kies celo estis akcepti kaj okupiĝi pri prostituitinoj. Onidire, la kanon-buloj montris la pordon tra kie viroj devis eniri por *ricevi la servojn*



Jen la kvin buloj ornamantaj
belan straton en Malago

de tiuj stratulinoj. Eble vi surpriziĝas pro la fakto ke ene de monaĥinejo okazis tiujn *servojn*, tamen estas necese memori, ke dum tiu epoko prostituado estis tute leĝa negoco kaj eĉ ekzistis la administracia ofico de "prostituisto" nomita de la gereĝoj mem, kies celo estis fiksi la normojn pri labor-tagoj, higieno ktp.

Fine, tria klarigo asertas, ke la kanon-buloj reprezentas paskan kandelon kies koloroj ne estas hazardaj. Tiel, la blua koloro reprezentas la ĉielon, la verda la esperon, ruĝa la sinoferon, viola la pentofaron kaj la flava koloro la dian majeston kaj la resurekton.

Kompreneble, la paso de tiom da jaroj forgesigis al malaganoj la signifon de tiu ornamo sur la faŝado de preĝejo. Hodiaŭ, tiuj kvin buloj estas alia plia invito por viziti la mirindan urbon Malagon.



Strato de la kvin buloj en Malago

JAM ESTAS EBLE ALIĜI AL 81-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. SEVILO 12a / 15a Oktobro 2023

Jam estas preta la TTT-paĝo por aliĝi al la venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazonta meze de la monato Oktobro en Seviljo. Kion vi atendas? Jen la momento! Aliĝu ĉe <https://kongreso.esperanto.es/eo>

NI ATENDAS VIN EN SEVILO !

YA ES POSIBLE APUNTARSE AL 81º CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO. SEVILLA, 12 al 15 de Octubre de 2023

Ya está lista la página en internet para apuntarse al próximo Congreso Español de Esperanto, que se celebrará a mediados de Octubre en Sevilla. ¿A qué esperas? ¡Ahora es el momento! Apúntate a través de la página:

<https://kongreso.esperanto.es/es>

¡TE ESPERAMOS EN SEVILLA!

Vorto-Ludoj



Krucvorto

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2					■			■
3								
4								
5						■		
6							■	
7					■			
8							■	

HORIZONTALA

1. Ano de religio, bazita sur la evangelioj.
2. Dio de la ventoj. ■ (Inverse) Konjunkcio esprimanta diferencon.
3. Persono, kiu diligente laboras per vizitado de kursoj en universitato aŭ alia simila supera lernejo.
4. Butiko, en kiu oni povas ricevi teon, eventuale kun kukoj.
5. (Sen la lasta vokalo) Plado dum eŭropeca manĝo, antaŭmetata post la supo aŭ la antaŭmanĝaĵoj. ■ Sufikso, signifanta unu el la konsistiigaj elementoj de tutaĵo.
6. (Sen la lasta vokalo) Kanada urbo. ■ Konsonanto.
7. (Inverse) Ekstrema, artikigita parto de la brako de homo aŭ de simio. ■ (Adverbe) Estaĵo de idnaska sekso.
8. (Inverse kaj plurale) Movo, per kiu la korpo svingas sin antaŭen, por ekkuri aŭ salti. ■ Konsonanto.

VERTIKALE

- A. (*Plurale*) Malgranda ujo, ordinare ligna, en formo de orta paralelepipedo.
B. Insekticido biomalkomponebla.
C. (*Adjektive kaj akuzative*) Ornamenta per bildoj.
Ĉ. (*Inverse*) Seksumadi en la estonteco, kun la celo havigi plezuron al si kaj al sia partnero.
D. Konsonanto. ■ Eksteren. ■ Konsonanto.
E. Grupo de falfoliaj arboj kaj arbustoj kun dentaj folioj kaj konussimilaj inksaj amentoj. ■ En tiu loko.
F. (*Inverse kaj akuzative*) Ekzistaĵo en abstrakta senco. ■ Finaĵo de akuzativo.
G. Vokalo. ■ (*Inverse*) Fervojo por rapida pasaĝertrafiko en grandaj urboj kaj ties ĉirkaŭaĵo, kun linioreto plejparte subtera.

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO

B	R	I	G	A	D	O
A	L	K	I	N	U	K
S	■	S	L	O	■	I
T	R	I	■	L	I	R
O	G	O	L	O	N	E
N	U	N	■	P	A	M
O	L	O	T	A	J	A

LINGVA VOJAĜO

ONUBO

ABONU

JUANO

JAENO

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





ESPERANTO

komprenemo inter popoloj

81^a

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
Sevilo, 12an-15an oktobro 2023